

La evangelio laŭ Maria Magdalena

Prezento fare de Gerrit Isai Berveling

kun la el-greka kaj el-kopta tekstoj

## *Broŝure:*

La evangelio laŭ Maria Magdalena  
Prezento fare de Gerrit Berveling  
Voĉoj Kristanaj 8  
VoKo, Vlaardingen 1985

## *Interrete:*

*La originalaj tekstoj:*

ne trovitaj

*Lastfoje kontrolita: 2020-05-12.*

# *Enkonduko al La evangelio laŭ Maria [Magdalena]*

La 23an de aprilo 1985 okaze de la jarkunveno en Dordrecht, Nederlando, de la Remonstranta Virin-Kontakto, kiel pastoro mi faru prelegon. Por tiu prelego mi elektis la *Evangelion laŭ Maria [Magdalena]*. La reagoj, kiujn ĝi vekis, donis al mi la impreson, ke estos eble senchave, traduki mian prelegon ankaŭ en Esperanton, por ke internacie oni ankaŭ legu ĝin. Tial en majo 1985 mi aperigis ĝin kiel n-ro 8 en mia serio *Voĉoj Kristanaj*<sup>1</sup>.

Kelkaj titoloj fundamente gravaj ĉi-terene:

Hans Jonas – *The Gnostic Religion*, Boston, 1963<sup>2</sup>

Elaine Pagels – *The Gnostic Gospels*, 1979; Nederlanda traduko: *De Gnostische Evangelien*, Amerongen, 1985

Gilles Quispel – *Gnosis als Weltreligion*, Leiden, 1951

James M. Robinson (red) – *The Nag Hammadi Library*, Leiden, 1977

Aurelio de Santos - *Los Evangelios Apócrifos*, edición crítica y bilingüe, Madrid, 1963

En universitataj bibliotekoj, fakuloj certe scios trovi Koptalingvajn eldonojn. Krome, ĉiuj verkoj menciitaj ankoraŭ plusendas al aliaj utilaj titoloj.

Sekvos la prelego en traduko<sup>2</sup>.

---

<sup>1</sup> Mi distingas ĉe miaj VoKo-eldonaĵoj inter la serio *Voĉoj Kristanaj* kaj la serio *VoKo-serio*.

<sup>2</sup> Prelegon neniam mi nur voĉlegas, sed depende de la reagoj de la ĉeestant(in)oj mi iom komentas aŭ klarigas diversajn erojn; sed jen la origina formo.

## *Kiam «Hereza» ne jam nomiĝis «Hereza»: Bunta Ekkristanismo*

De pluraj flankoj mi sciiĝis, ke tre diligente oni ekserĉis la *Evangelion laŭ Maria [Magdalena]*, post kiam la anoncon pri la hodiaŭa tago oni legis. Sed: montriĝis esti tre malfacile: neniu ŝajne ĝin trovis<sup>3</sup>.

Por klarigo jen kelkvorte:

Ni, en reformaciaj eklezioj, konas en la Biblio sufiĉe grandan aron da 'verkoj', el kiuj kelkaj estas ampleksaj, kelkaj malpli grandaj, eĉ foje nur 'poŝtkart-formataj'. Tiujn verkojn de la Biblio ni kutime dividas en Oldan Testamento (OT) kaj Novan Testamenton (NT). – Sed, se trafolumi Biblion eldonitan de Rom-Katolika instanco, tie ne nur troveblas ĉiuj titoloj, kiujn ni konas en la Biblio (kaj OT kaj NT), sed krome inter ili estas kelkaj por ni *novaj* titoloj. La plej famaj el inter tiuj estas ekzemple la libro *Tobit* (aŭ *Tobias*), la *Makabeoj*, la *Saĝeco de Jesuo Siraĥ*, la *bela rakonto pri Suzana baniĝanta*. Tiujn librojn la Rom-Katolika Eklezio konsideras oficiale apartenantaj al la Biblio (tiel difinis la Koncilio de *Trento*), dum en la tradicio sub influo de Kalvinismo (do ankaŭ ĉe la Nederlanda Bibli-Societo) oni ne konsideras ilin bibliaj verkoj. Mallongadire: ĉio, troviĝanta en la protestanta Biblio ankaŭ troveblas en la rom-katolika Biblio; sed ĉi lasta krome enhavas kelkajn aliajn titolojn. Nu, ĉi lastajn verkojn, ĉi «mezan grupon» oni nomas la «deŭterokanonaj

---

<sup>3</sup> Intertempe la situacio sufiĉe ŝanĝiĝis: nuntempe tiaj tekstoj pli facile troveblas, minimume rete.

verkoj»<sup>4</sup> – kvankam protestantaj aŭtoroj foje nomas ilin neprecize «apokrifaj».

Mia opinie tamen estas pli saĝe, rezervi la terminon «apokrifa» por tute alia kategorio da verkoj. Ekzistas ja aro da verkoj, kiujn neniu eklezio konsideras kanonaj, kvankam ĉu forme ĉu enhave ĉu intence ili 'povus esti fariĝintaj «kanonaj» en iu ajn formo'. Origine grandparte iliaj aŭtoroj kaj iliaj unuageneraciaj legintoj intencis kaj konsideris ilin minimume same seriozaj kiel la 'normalaj' verkoj en la Biblio, ĉu OT ĉu NT. Kaj tiujn do librojn, kiuj iel 'malsukcesis', maltrafante la kanoniĝon en la Biblio, ni nomas «apokrifaj», laŭlitere 'apokrifa' signifas nur 'kaŝita', ĉar la frua Eklezio ilin je certa momento / stadio de sia evoluo ekkaŝis, por ke la kredantoj ilin ne plu legu.

Espereble ĉi distingo nun estas klaraj.

Unuflanke la Biblio, kun en ĝi: a) la verkoj de OT; b) la 'duakanonaj' verkoj nur uzataj de la Rom-Katolika Eklezio<sup>5</sup>; c) la verkoj de NT – kaj aliflanke la libroj, kiujn neniu eklezio akceptis kiel kanonajn: la 'apokrifajoj'.

Nu, unu el tiu apokrifajoj estas la *Evangelio laŭ Maria [Magdalena]*. Do, en neniu Biblio-eldono oni ĝin renkontos.

Demando: do kie jes, se ne tie? – Unualoke en sciencaj eldonaĵoj, en studaĵoj troveblaj en universitataj bibliotekoj. Mi mem estas tradukanta plurajn tiajn apokrifajn evangeliojn en Esperanton. Post kelkaj jaroj<sup>6</sup> ili devos aperi – se ĉio iros laŭintence. Konklude: por ne-fakulo estas ĉiam hazardaĵo, se tian apokrifan evangelion oni trafas ie, ĉar la sciencajn eldonojn ne-fakulo ja ne ofte konsultos, ĉu ne?

Ni tuj eklegos la *Evangelion laŭ Maria [Magdalena]*; tiel ni nomas ĝin kutime. Ne, ke Maria ĝin verkis, ĉar ne estas sciata kiu ĝin verkis, eĉ ne

---

<sup>4</sup> La Duakanonaj Libroj.

<sup>5</sup> Pri la situacio en la Orient-kristana Ortodoksio mi intence silentas ĉi tie.

<sup>6</sup> Daŭris 'iom' pli longe: la nuna volumo. Intervenis malrapidige mia traduklaboro super NT kaj Duakanonaj Libroj.



certas, ke virino ĝin verkis. Certe Maria Magdalena ne povas esti la aŭtorino, ĉar ĝi datiĝas de tro malfrua epoko. Fakte, same kiel ĉe la granda plimulto de la apokrifajoj, ankaŭ ĉe tiu ĉi teksto ni nur povas konstati ĝian anonimecon.

Antaŭ eklego ankoraŭ du avertojn miaflanke, aŭ eble tri:

a) La *Evangelio* estis nur fragmente trovita; do vi ne ektimu, se foje iu frazo iom fremde konstruiĝas aŭ ne bone fluas.

b) Por komenci mi prezentos al vi nur la fragmenton, kiun jam en 1896 oni retrovis en Egiptujo en la Helena lingvo. La Helena estas la originala lingvo; multe pli poste oni ankoraŭ trovis fragmentojn en la Kopta<sup>7</sup> lingvo, sed tiujn mi donos poste al vi. Espereble aŭtomate komprenebliĝos la kialo por tio. Se necese, mi poste klarigos.

c) Vi bonvolu legi ĉi tiajn tekstojn kiom eble plej senantaŭjuĝe; intence mi ne donas anticipu interpretojn. La enhavo mem estu centra: provu mem tute freŝe legi ĝin, sciante, tamen, ke ĉi tiu teksto datiĝas el pli malpli 100 ĝis 150 p. Kr.

---

<sup>7</sup> La vorto *kopt* etimologie ligiĝas al *egipt*. Ĝi estas pli nova stadio devena el la praa faraona lingvo.

*(La sekva fragmento estis trovita en 1896 en Egiptujo en la Greka lingvo. Maria ĵus rakontis pri vizio, kiun ŝi sola estis ricevinta de la Resurektinta Jesuo.)*

<...> la kvieto, la tempo <...>

Tion ĉi dirinte, Maria silentiĝis, ĉar ĝis tiam parolis al ŝi la Savinto.

Sed Andreas ekparolis al la fratoj: Kion vi opinias pri ĉi diraĵoj? Ĉar mi ja ne kredas, ke la Savinto tion diris: ĉar ĝi ja estas klare deviaj ideoj.

Petro ekparolis kaj parolis jene: li demandis pri la Savinto: Ĉu li do, preterante nin, kaŝe, parolis al virino? Ĉu ni do turniĝu kaj ĉiuj ekaŭdu ŝin? Li ja ne volis montri ŝin pli valora ol ni?! ...

Tiam Maria, plorante, diris al Petro: Petro, mia frato, kion vi ekpensas? Ĉu vi kredas, ke tion ĉi mi imagas en mia koro, aŭ ke mi mesogas pri la Savinto?

Levi ekparolis kaj diris al Petro: Petro, ĉiam koleriĝemo vin jam ĉeestas; nun mi vidas, ke vi diskutas kun ĉi virino, kvazaŭ kun kontraŭuloj. Se la Savinto ŝin opiniis digna, kiu do estas vi por ŝin malŝati? Estas certe, ke la Savinto ŝin tre bone konis kaj ke tial li ekamis ŝin pli ol nin. Prefere ni hontu! Ni vestu nin per la perfekta Homo kaj <ni plenumu> nian taskon, ni prediku la evangelion, neniom limigante nek leĝofarante, krom laŭ kion diris la Savinto.

Tiam Levi <...> kaj ili foriris por prediki la evangelion.

*Disdoninte ĉi tekstofragmenton, mi donis iom da tempo, por ke la ĉeestantinoj legu ĝin plene atente. Post tio estiĝis interparolo pri tio, kion oni trovis en ĝi interesveka aŭ neatendita k. s.*

*Oni i. a. menciis la fakton, ke – ŝajne – jam tiel baldaŭ oni povis uzi la esprimon Savinto por Jesuo. Tiu vorto ja sonas tre ortodoksa; kelkaj nomis ĝin eĉ karakterize ortodok-protestanta: mirante, ke ĉi praa teksto jam tiel parolas. La dua afero, kiu estis menciita, estas la fakto, ke temas pri kvazaŭ interbatalo inter viroj kaj virino pri la demando, kies parolo havu valoron. La viroj (krom Levi) emas bagateligi aŭ senfortigi la rakonton de Maria, kiu tamen atestas, ke jes tiel diris Jesuo: ŝi havis mesaĝon de li. Do ŝi devas atesti pri ĝi. Sed Andreas eĉ nomas ĝin 'deviaj ideoj': tio do implicas, ke jam estas ekestiĝanta certa dogma vortigo de la fido. Plue menciita estis, ke enestas la kontraŭeco inter la emo babiladi kaj la emo ekaktivi, ekagi: Prefere ni hontu, ni ekagu, ni prediku.*

*Post la paŭzo, mi jene daŭrigis:*

La historion ĉiam verkas la venkintoj. Kaj ne nur la historion politikan aŭ militistan. Se, ekzemple, ne la aliancanoj estus venkintaj la Duan Mondmiliton, sed faŝistoj kaj naziistoj, sendube la nunaj histori-libroj aspektus absolute malsame. Sed la sama vero ankaŭ validas en la religia historio. Kvankam por multaj homoj tio ĉi nepre ne estas same klara.

En la hodiaŭa Ekumena Movado foje aŭdiĝas, ke unu el la celoj de Ekumeno estu: retroiri al la origina Unueca Eklezio de la Ekkristanismo. Rekonstruo de la perdita unueco: sonas bele, sonas romantike preskaŭ – sed: bedaŭrinde, ne estas plene reale tiel paroli, ĉar Kristanismo neniel komenciĝis kiel io unueca. Kaj tamen: vivas ĉe multaj ĉi bildo de pra-unueco perdiĝinta. Jen, do, en la praktiko, tre klara ekzemplo de tio, ke la historion verkis la venkintoj.

Kiel envere aspektis Kristanismo en la unuaj jarcentoj, se ĝi do ne estis unueca, unuforma? Schillebeeckx (Ŝhílebĕks) en siaj libroj *Kerkelijk Ambt* (1980) kaj *Pleidooi voor mensen in de kerk* (1985) priskribas tre detale la formiĝon de la ekleziaj oficoj. La unuaj lokaj eklezioj / komunumoj / ἐκκλησία estis ege malsamaj en multaj rilatoj. Ni prenu la organiziĝon. Jam epoke de la verkado de NT (do sufiĉe frue!) ekzistis ekzemple



eklezioj (Korinto ekzemple) kie ĉiu surbaze de la inspiro fare de la Spirito povis kontribui la sian al la komuna tutaĵo, ĉu viro ĉu virino, pere de profetado, parolante en lango-lingvoj, sanigante, instruante, kun apogado, kun gvidado, kun interpretado ktp – sen ajna klara sistema strukturo de oficoj en eĉ nur iom formala senco; – apud tio ankaŭ ekzistis eklezioj lokaj (en pliposta evoluo paŭlana / duapaŭla) kie oni havis certan taskodividon: tie oni konis apostolojn, profetojn, evangelistojn, paŝtistojn kaj instruistojn unu apud la alia – do ne plu ĉiu povis ĉion fari laŭ la momenta inspiro, sed difinitaj homoj havis difinitajn taskojn: jen ekiĝo, oni povus diri, de la eklezia 'ofico'; – en la leteroj al Timoteo kaj Tito, 1 Petro kaj Jakobo jam renkontiĝas evoluo iom pli detaliĝinta: tie oni ekparolas pri 'episkopoj' (= kontrolisto / inspektisto, kiel unu-persona gvidanto de la eklezio) apud 'presbiteroj' (= pliaĝuloj kiel helpantoj de la ĉefa kontrolisto), kvankam en la samaj leteroj – do ankaŭ en ties eklezioj – foje ambaŭ terminoj estas ankoraŭ uzataj sendistinge por la samaj personoj. Samepoke estis verkita la *Didaĥeo*<sup>8</sup>, en kiu ankaŭ estas parolate pri migrantaj profetoj apud la lokaeklezie loĝantaj kaj agantaj instruantoj kaj 'episkopoj', kiujn oni elektu mem, ktp (pri profeto profite oni sufiĉe akrate konstatas, ke tiu estas falsa profeto: do ekestis certa 'problemo' pri oficantoj). En *Agoj de Apostoloj* i. a. estas menciite, ke certa Filipo havas plurajn filinojn, kiuj oficas kiel profetinoj. Krom tio ekzistas ankaŭ eklezioj (ekzemple tiu, kiu liveris al ni la *Evangelio laŭ Mateo*), kie oni ĝenerale estis tre retenema rilate ajnan oficialan formalan oficon; laŭ la Johano-evangelio ĉiuj senescepte kredantoj havas la Spiriton, kaj sekve specifaj oficoj ŝajne estas superflujaj. Sed, kiel montras la Johano-leteroj, tuj kiam ekestas problemoj en tiaj eklezioj, en ĉi Johano-eklezioj oni staris tre sendefende, senhelpe. Mankis aŭtoritato.

La demando, kiun komence mi starigis: Kiel en la unuaj jarcentoj aspektis Kristanismo? – nu, laŭ la verkoj ĉi-temaj de Schillebeeckx ni iom vidis, ke en la diversaj lokaj eklezioj oni en multaj tre malsamaj manieroj klopodis trovi ian 'formon' por la eklezia komunumo. Foje tute sen specifa strukturo, unuavide; foje kun tre klara taskodivido; foje kun

---

<sup>8</sup> Vidu ĉi-interrete.

subordigo sub unupersona gvidado; foje kun nur viroj ĉe-kape; foje virinoj egalrajte je viroj gvidis la eklezion; ktp.

Se ekstrakti aliajn terenojn, ni povus prezenti superrigardojn pli-malpli similajn: ekzemple pri la enhavo de la fido: la demando: Kiu finfine do estas Jesuo? Kio li estas precize dirite? – Por unuj iu Dio maskita kvazaŭ homo; por aliaj vojmontranto, kiu instruas al ni homoj kiamaniere atingi la luminiĝon; por aliaj grandega profeto; aŭ anĝelo; aŭ filo de iu Dio, kiel la Romia-Helenisma mondo ja konis multajn, ktp ktp.

Pri etiko io tia. Ekzistis eklezioj kristanaj, kie la ĉefaj demandoj etikaj estis je la tereno de: ĉu kristano rajtas jes aŭ ne ĉeesti teatran prezentadon? ĉu virino rajtas iri surstrate sen vualoj? kiomfoje ĉiutage oni preĝu la Patronian? kiaj manĝaĵoj estas permesitaj / malpermesitaj? ktp ktp; sed aliaj ekzistis, kie gravegis: Kio estas antaŭdestino? aŭ kiom la homaj agoj influas ĝin (aŭ inverse)?; ree aliaj pli-malpli imitis la Romiajn-Helenismajn popularegajn filozofojn, kunteksante listigojn de tio, kio 'decas' aŭ ne.

Ree aliterene: Ekzistis eklezioj tre malfermitaj, kie ĉiu alveninto, ĉu Judo ĉu ne, ĉu kristano ĉu ne, estis senplie bonvena kaj povis partopreni en ĉio, eĉ en la Sinjormanĝo; aliflanke ekzistis grupoj tiom fermitaj, ke nur post longa studado kaj iniciĝo oni rajtis partopreni la misterojn de la fido, en la eŭkaristia celebrado.

Mallongadire: ekzistis ja tiom da diferencoj.

Kaj ĉiuj tiuj komunumoj / eklezioj / grupoj da Jesu-kredantoj / Jesu-fidantoj aŭ kiel ajn nomi ilin: ili ĉiuj diskonigis al la ĉirkaŭa mondo sian interpretadon, sian komprenon pri Jesuo de Nazaret. Kaj ili verkis leterojn, reciproke, al eklezioj vizitotaj, al eklezioj kie antaŭe oni laboris, al kolego-eklezi-gvidantoj, al kunreligianoj de la propra tendenco, ktp. Kaj evangeliojn ili ankaŭ verkis, ĉiu laŭ la propra eklezia vivo kaj tradicio<sup>9</sup>.

---

<sup>9</sup> Vidu ĉi-verke ĉe Apokrifaj evangelioj k. s.

Kaj reciproke ili klopodis por konverti la ceterajn, por ke ili fariĝu ĉiam pli bonaj kristanoj.

Kaj apud ĉio ĉi, kaj eĉ rekte tra ĝi, estis la neceso defendi la religion kontraŭ la ĉirkaŭa mondo. Unuflanke ĉe la tumultoj, se en kvartalaĉoj pogromoj okazis kontraŭ kristana areto (Tertuliano tion ironias: pri ĉiu publika katastrofo, pri ĉiu popola malagrablo, de la komenco de la tempo, la kaŭzo ĉiam estis serĉata ĉe la kristanoj. Se Tiberio leviĝis ĝis la remparoj, se Nilo ne elverŝiĝas sur la kampojn, se la ĉielo senmovas, se moviĝas la tero, se estas malsato, se pesto – tuj: «La kristanojn al la leono!» – Tiom al unusola? *Apologio* XL:1-2.) – ĉar same kiel dum Mezepoko kaj Renesanco en pluraj periodoj la Judoj pri ĉio estis la pekoŝafoj, same tiel en la unuaj jarcentoj ie-tie la kristanoj.

(Kvankam refoje ni memoru: la historion verkis la venkintoj; kaj la imponaj procesioj da martiroj, kiujn priskribis i. a. Sienkiewicz en *Quo vadis*, almenaŭ parte estas fantaziaj.)

Alia minaco de ekstere estis pli intelektula: la filozofoj, la scienculoj, kiuj provis pruvi, ke Kristanismo estas ne serioza afero, sed nura amaso da fabeloj, mitoj ktp. Ankaŭ kontraŭ tio oni devis defendi Kristanisman.

Kaj por koncizigi longan historion: ĉi tiu defendo okazis i. a. jene. Oni ek-selektis inter la verkoj kristanismaj: nepre ne plu ĉion la kredantoj legu; la eklezian strukturon oni plifirmigis – kaj antaŭ ol pasis plenaj du jarcentoj, preskaŭ ĉie la virinoj malaperis el la gvidaj pozicioj kaj oficoj: ĉ. 250 p. Kr. certa Firmiliano, episkopo, skribas al sia kolego Cipriano pri virino en Kapadocio kaj Ponto (nuna Turkujo): «inter la ceteraj aferoj, per kiuj ŝi forlogis multajn, ŝi ankaŭ ofte kuraĝis fari tion, ke per efika alvoko ŝi sanktigis la panon kaj ŝi ŝajnigis plenumi la eŭkaristion kaj oferis al la Sinjoro la oferon kun la kutimaj ritaj paroloj, krome ŝi multajn baptis uzante la kutimajn kaj oficialajn vortojn ĉe la pridemandado, tiel ke en nenio ŝi ŝajne deviis de la regulo eklezia» – kaj ĉe tio li estis kolera, ke tio (ankoraŭ) okazas. Sed post 300 p. Kr. tia kolero preskaŭ ne plu estas bezonata, ĉar la virinoj tion ĉi simple ne plu faras.

Krom tio finfine ĉiu loka eklezio ekhavis strikte unupersonan gvidadon, ja ekestis eĉ superstrukturo super pli-malpli la tuta tiuepoke konata



mondo: kun la Patriarkuoj de Jerusalemo, Aleksandrio, Antioĥio, Romo kaj pli poste Konstantinopolo – kaj en Okcidento tio fine rezultis en la Papecon.

Kaj kion pri la senfine bunta variado de la unua Kristanismo?

Grandparte ĝi malaperis, ĉar pluraj eklezioj adaptiĝis, absorbiĝis, asimiliĝis je la t. n. 'ortodoksa' Eklezio, kiu formiĝis, tre unueca, multe pli fortika ol antaŭe, kun slogano kiel *Ekster la Eklezio neniu savo*. Vidu Ciprianon kun ties verko *La unueco de la Katolika Eklezio*.

La ceterajn, kiuj ne absorbiĝis, kiuj ne asimiliĝis, kiuj ofte ankoraŭ dum jarcentoj plu ekzistis: tiujn la Granda ortodoksa Eklezio eknomis 'herezaj'.

Tio koncernas i. a. la ekleziojn, kiuj ekzistis en Palestino, en Sirio, en Mezopotamio (nuna Irako), kiuj en multaj specifaj trajtoj retenis la etoson kaj teologion de la Jerusalema eklezio de Jakobo: herezaj oni eknomis ilin ... La ekleziojn en Malgrand-Azio (nuna Turkujo) kaj Nord-Afriko (nuna Tunizio) kie unu profeto, Montano, kaj du profetinoj disvastigis la t. n. Montanisman, iom parencajn je la nunaj Pentekostalaj eklezioj: herezaj oni ilin nomis ... La ekleziojn, kie Jesuon oni rifuzis senplie kvazaŭ identigi je la Patro: herezaj tiujn oni nomis ...

Eble oni povas diri, sociologie, ke la estigo de fortika strukturo unuforma estis necesa por Kristanismo, por ke ĝi pluvivu – meze de pogromoj kaj intelektulaj atakoj, meze de ŝtataj persekutoj kaj skeptikismo, kaj meze de la amasego da konkurencaj religioj tiuepokaj. Eble estis iasence vivbezono por pluvivi, tuta tiu serĉado de unuforma unueco: la fiksado de kanono de sanktaj skriboj (NT); la difinado de plej precize fiksitaj roloj por viroj kaj virinoj en la eklezio, kun la episkopa gvido ĉekape; la difinado de tio, kion oni devas kaj rajtas kredi – kaj kion ne – refoje: eble certasence tio estis vivbezona por tiuj kredantoj, kiuj subtenis tion plenkore kaj plenforte, sed kiel historiisto samtempe oni devas konstati, ke Kristanismo povus esti formiĝinta tute alie: ekzemple kun multe pli da egaleco inter la seksoj, kun malpli da difinado religia, malpli da teologio, kun multe pli da spaco por la empiria flanko, la spertiĝa flanko de religio (ĉar kiel ajn 'sciencece-teorie' oni priskribu dogmojn, *origine eĉ*



la dogmoj ekestis el fakta travivado, el religia empirio de difinitaj homoj: sperto, travivo estis decidiga!)

Granda nombro da tiuj, kiujn oni eknomis herezuloj, kutime estas kolektive nomataj 'gnostikuloj'.

Kaj ĉar la *Evangelion laŭ Maria [Magdalena]* oni atribuas al la gnostiko, por fini mi volas ankoraŭ iom paroli pri tiu temo.

Gnostiko devenas de γνῶσις (gnosis); tio estas Greka vorto por 'scio' aŭ 'kono'. Sed la malnovaj Grekoj posedis ankoraŭ alian vorton pli-malpli samsignifan: ἐπιστήμη. Sed tiu lasta vorto (episteme) estas 'scio' en scienca senco: pruvebla, bazita je rezonado. Gnosis estas scio alispeca, scio bazita prefere je travivo, je persona sperto; ekzemple kun iu homo oni vivas intime longan tempon: tiun homon oni do ekkonas, pri li / ŝi oni ekhavas 'scion'. Certe, sed nepre ne sciencan scion, sed spertadan. Gnosis: tiun vorton oni ankaŭ povas uzi ĉe la religio. Kredo, fido je Dio, estas i. a. bazita je sperto, je sento de apudeco de Dio, de vivado kun Dio. Kaj tio estas tute alia afero ol scienca scio.

Nu, la gnostiko tre forte akcentis la spertan scion en la religio. Kompreneble, ne nur tie ĝi estis grava: ankaŭ ĉe la ekpredikado de la unuaj apostoloj ilia sperta scio estis decidiga faktoro apud aliaj (ili ja spertis kunvivadon kun Jesuo dum ties vivo; ili spertis lian ĉeeston ankaŭ post-paske); ankaŭ ĉe Paŭlo, kiu Jesuon ne estis koninta dum ties vivo, sperto estis decidiga: vidu kiel oni rakontas pri lia konvertiĝo antaŭ Damasko! Estis vere skua sperto! Ankaŭ poste: en *Agoj* estas rakontate, kiel Petro surbaze de spertita vizio pri iu tuko enhavanta ĉiuspecajn 'malpurajn' bestojn, malsupreniĝanta el la ĉielo, konvertiĝis rilate sian sintenon al ne-Judoj (*Agoj* 10).

Nu, en la gnostiko ĉi sperta scio restis treege viva. Kaj multaj simboloj kaj formoj kaj bildoj el la Romia-Helenisma kulturo estis utiligataj por iom vortigi la plej diversajn spertojn religiajn. Ofte tio liveras tre buntan tutajon. Sed, por esti honesta, mi devas aldoni, ke por simplaj nespertaj nuntempuloj ofte iliaj simboloj restas sufiĉe enigmaj kaj neklaraj. La formoj, kiujn oni utiligis por vortigi, por pludoni siajn spertojn Dirilatajn, – tiuj formoj foje estas rekte erarigaj por ni nunuloj.

En la granda vizio, kiun havis Maria Magdalena laŭ la teksto, kiun tuj mi disdonos, temas pri la bildo de Vojaĝo: ŝia animo suprenvojaĝas en la ĉielon kaj dumvoje renkontas simbolajn figurojn. Ja iel pensigas pri Mezepokaj mistikaj tekstoj.

Religia travivita sperto, malfacile balbuta vortigo neklara – iom parenca al mistikaj tekstoj –: jen unu flanko de la *Evangelio laŭ Maria [Magdalena]*. La alia flanko estas la rezisto de certa fluo en frua Kristanismo kontraŭ la pliforta tendenco, kiu provizore estos venka: Maria Magdalena ja agas tre memfide kiel kred-atestantino: Ŝi havas mesaĝon de Jesuo, kiun ne konas la ceteraj; kaj Petro, ŝia oficiala kontraŭulo, rolanta la institutiĝintan eklezion, tion rifuzas akcepti: Petro protestas: Virinoj en religiaĵoj ja ne povas ekgvidi, direkti. –

Historie rigardante, ni devas konstati, ke – se diri skeme – venkis la linio de Petro: venkis portempe la evolulinio dogmema; la eklezioj, kie estis egalrajtaj viroj kaj virinoj ankaŭ eklezi-ofice, kie dogmojn oni ne difinis, kie religia travivado, kie sperta scio religia estis esenca dimensio de la fido, – tiuj eklezioj dum la jarcentoj estis kvazaŭ englutitaj de la pli granda pli ortodoksa (pli rektlinie kredanta) eklezio, de la eklezio kun difinita kanono, kun oficoj plurŝtupaj, kun pliklariĝanta diferencigo inter la pastroj nur viraj unuflanke kaj la nepastra gelaikularo aliflanke ...

En nia epoko tiaj ĉi tekstoj, kiel ĉi *Evangelio*, ie tie retroviĝas, laŭ hazardoj. Se en Mezepoko tio estus okazinta, oni ilin bruligus kiel herezajn, mi supozas. Kaj mi kredas, ke tiu retrovado estas bona kaj utila.

Ne, ke de nun subite ni aliĝu ĉiuspecajn opiniojn kaj eldirojn de 'hezeruloj' nur tial, ĉar siatempe ili estis malakceptitaj: tiaj renversigoj neniam havas sencon en historiaj procezoj. Krom iliaj eldiroj kaj opinioj ja ankaŭ strangaĵoj estas trovataj: la 'ortoduksuloj' almenaŭ plurloke havis certe gravan kialon por malakcepti herezaĵojn; sed aliflanke, inter ĉi tiaj tekstoj, kondamnitaj kiel neakcepteblaj (pro kiu ajn kialo), nepre renkontiĝas aferoj prave inspiraj. – Mi ja kredas, ke estas bone ekkoni la ekestoperiodon de Kristanismo. Kaj tiaj ĉi praaj tekstoj ĉe tio estas utilaj. – Kaj, ĉu ne?: de pluraj demandoj, kaj de pluraj problemoj tiuepokaj oni ne jam plene kuraĝus aserti, ke ili solviĝis je ĉies kontentigo: ĉio ĉi estis

kaŭzo sufiĉa por mi, por ke hodiaŭ mi prezentu al vi la *Evangelion laŭ Maria [Magdalena]*.

(Oni prezentu al si, eklegante tiun ĉi tekston<sup>10</sup>, ke okazas interparolo inter la Resurektinta Kristo kaj aro da gedisĉiploj.)

---

<sup>10</sup> Daŭrigo de la prelego, per kiu mi prezentis enkonduke *La Evangelion laŭ Maria [Magdalena]*.



# *Evangelio laŭ Maria [Magdalena]*

– tradukita el traduko el la Kopta –

<...> La materio, ĉu neniigōs aŭ ne?

La Savinto diris: Ĉio en la naturo, ĉiuj formoj kaj kreaĵoj ekzistas en kaj per kaj kun la ceteraj kaj ĝis siaj propraj radikoj ili ree dissolviĝos. Ĉar la esenco de la materio dissolviĝas je ties <origina> propra esenco. Kiu havas orelojn por aŭdi, tiu aŭdu!

Petro diris al li: Tion ĉi klariginte, vi ankaŭ jenon ankoraŭ rakontu: kio estas la peko de la mondo?

La Savinto diris: Peko ne ekzistas. Sed vi estas la pekofarantoj, nome se agojn vi faras, kiuj esence estas identaj je tiu adulto, kiun oni nomas 'peko'. Tial venis la Bona en vian mezon, irante al la esencaĵo de ĉiu fenomeno, por ripari ĝin en ĝia radikoj. Plue li diris: La kaŭzo, kial malsaniĝas vi kaj mortas, estas, ke vi <amas> tion kio <...> Kiu povas kompreni, tiu komprenu!

Senegala pasio estas generita de la materio, ĉar ĝi estiĝis je maniero kontraŭnatura. De post tiam ekzistas konfuzo en la tuta korpo. Tial mi diris al vi: Kuraĝon do! Kaj, se foje vi senkuraĝiĝas, tiam tamen kuraĝu konfronte la multajn aĉaĵojn de la naturo. Kiu orelojn havas por aŭdi, tiu aŭdu!

Post kiam la Benata diris ĉi tion, li salutis ilin ĉiujn per ĉi paroloj: Paco estu kun vi. Ricevu la pacon kaj atenton, ke neniu mistifiku vin dirante: Jen ĉi tie, aŭ: Jen tie. Ĉar la Filo de Homo



troviĝas en via interno. Tiun vi sekvu! Kiuj lin serĉas, tiuj lin trovos. Foriru vi kaj prediku ĉi evangelion de la Reĝeco. Neniun alian ordonon vi ordonu krom tio, kion mi ordonis al vi. Kaj neniun leĝon vi proklamu, kiel faras la leĝodonanto, por ke vi ne iĝu ties kaptitoj.

Tion dirinte, li foriris.

Sed ili estis tristaj kaj ekploregis kaj ili diris: Kiel ni do iru al la <paganaj> popoloj por prediki la Reĝecon de la Filo de Homo? Se lin oni ne indulgis, kiel oni do indulgos nin?

Tiam ekpaŝis Maria en la mezon kaj ŝi salutis ilin ĉiujn kaj ŝi diris al la fratoj: Ne ploru, ne estu tristaj, ne dubu, ĉar lia graco estos ĉe vi plene por ŝirmi vin. Prefere ni laŭdu lian grandecon, ĉar li formis nin kaj faris nin homoj. Per ĉi vortoj Maria turnis ilian koron al la Bona kaj ili komencis parole pri la paroloj de <la Savinto>.

*(Tiam Petro invitas Marian Magdalenan, ke ŝi rakontu, kion ŝi ricevis kiel personan 'scion' pri Jesuo. Unu vision ŝi rakontas do kaj – tre moderne – anticipe ŝi starigas ĉe tio la demandon, kiamaniere la homoj perceptas tian vision?)*

Petro diris al Maria: Fratino, ni scias, ke la Savinto amis vin pli ol la ceterajn virinojn. Rakontu do al ni, kion vi memoras el la paroloj de la Savinto, la paroloj, kiujn scias vi kaj kiujn ni ne scias kaj kiujn ni ankaŭ ne aŭdis.

Maria respondis: Mi konigos al vi, kio restis por vi kaŝita. Kaj ŝi ekrakontis, kiel sekvas: Mi – ŝi diris – mi vidis en vizio la Sinjoron, kaj mi diris al li: Sinjoro, hodiaŭ en vizio mi vidas vin. Li respondis al mi: Vi estas feliĉa, ke vi ne ŝanceliĝas vidante min; ĉar kie estas la prudento, tie estas la trezoro. Mi diris al li: Sinjoro (diru al mi) nun: tiu, kiu vidas vizion, ĉi tiu vidas per la spirito aŭ per la animo? La Savinto respondis: Tiu nek per la animo nek per la spirito ĝin vidas, sed per la prudento, kiu estas meze de ambaŭ, li vidas la vizion kaj tio <...>

*(Tie ĉi estas lakuno ege longa; pli-malpli same longa kiel la teksto mem ĝis nun.*

*En ĝi, Maria i. a. rakontas la unuan parton de la vizio. La vizio estas legebla kiel Vojaĝo al la ĉielo, fare de la homa animo, rekte tra ĉiuspecaj malhelpantaj baroj. Ĝi estas suprenirado de l' animo postmorte ĝis fine ĝi ekhavas trankvilon: por tio ĝi unue devas venki la barojn de kvar 'potencoj': mallumo, deziro, nescio kaj sepobla kolero.*

*La feminisma teologino Maria de Groot [NL] proponas, ke oni legu la vizion kiel bildigon de psika baraktado por akiri trankvilon kaj ekvilibron: baraktado kiun konas eble ĉiu homo proprasperte. Tiun ĉi specon de gnostikaj 'mitoj' oni povas legi – ŝi diras – kiel psikologiajn analizojn aŭ terapiojn 'avant la lettre' [en epoko kiam ne jam ekzistis tia termino].*

*La Vojaĝo al la ĉielo certasence estas stereotipa; same la simbolaj 'potencoj', kiujn survoje oni devas venki. – Ankaŭ en la persona evoluovojo, la homoj ofte renkontas kvazaŭ stadiojn iom similajn: precipe ĉe la virinoj kiuj aliĝas feminisman movadon, ofte 'sepobla kolero' montriĝas nemalhavebla stimulo por ekkonsciiĝi pri sia – subpremata – situacio, almenaŭ laŭ Maria de Groot.)*

<...> kaj la Deziro diris: Mi ne vidis vin malsupreniranta, sed nun mi vidas vin supreniranta. Kial vi mensogas <al mi>, dum vi apartenas al mi? La animo respondis: Mi vidis vin, sed vi ne vidis min kaj ne rekonis min. Mi estis kvazaŭ vestaĵo por vi, sed vi ne konis min.

Tion ĉi dirinte, kun multe da gajeco ŝi foriris.

Tiam ŝi atingis la trian potencon, kiu nomiĝis Nescio. Tiu demandis la animon: Kien vi iras? Vi estas malice perfortita sed <...> Ne juĝu.

Kaj la animo diris: Kial vi juĝas pri mi, dum mi ne juĝas? Mi estas uzurpita, kvankam mi mem ne uzurpis. Mi ne estis rekonita. Tamen mi komprenis, ke la Ĉiomo solviĝos, kaj la terana kaj la ĉielana.

Post kiam la animo pasis la trian potencon, ŝi plu iris supren kaj ekvidis la kvaran potencon. Tiu posedis sep figurojn. La unua estas mallumo, la dua dezirego, la tria senscio, la kvara estas mortiga envio, la kvina la regado de la karno, la sesa estas la stulteco de karna saĝeco, la sepa estas kolerega saĝo. Tio estas la sep <potencoj> de la kolero. Kiam ili demandis la animon: Kio estas via origino, murdintino? kaj Kien vi estas survoje, vi malakceptanta loĝejojn?, la animo respondis: Kiu min ekkaptas, estas mortigita, kaj kiu min ĉirkaŭas, estas flankenmetita. Mia deziro ĉesis kaj la nescio mortis. Mi estas liberigita el unu mondo en <alian> mondon kaj el la ĉiela ekzemplo en <alian> ekzemplon. <Mi estas liberigita> el la ĉenoj de mallonga forgeso. De ĉi momento, mi silente eniros la kvieton, ekster la tempo, la momento, kaj la daŭro.

*(Kaj meze de ĉi lasta frazo komenciĝas la Greklingva fragmento, kiun jam en 1896 oni estis trovinta.)*

Tion ĉi dirinte, Maria silentiĝis, ĉar ĝis tiam parolis al ŝi la Savinto.

Sed Andreas ekparolis al la fratoj: Kion vi opinias pri ĉi diraĵoj? Ĉar mi ja ne kredas, ke la Savinto tion diris: ĉar ĝi ja estas klare deviaj ideoj.

Petro ekparolis kaj parolis jene: li demandis pri la Savinto: Ĉu li do, preterante nin, kaŝe, parolis al virino? Ĉu ni do turniĝu kaj ĉiuj ekaŭdu ŝin? Li ja ne volis montri ŝin pli valora ol ni?! ...

Tiam Maria, plorante, diris al Petro: Petro, mia frato, kion vi ekpensas? Ĉu vi kredas, ke tion ĉi mi imagas en mia koro, aŭ ke mi mesogas pri la Savinto?

Levi ekparolis kaj diris al Petro: Petro, ĉiam koleriĝemo vin jam ĉeestas; nun mi vidas, ke vi diskutas kun ĉi virino, kvazaŭ kun kontraŭuloj. Se la Savinto ŝin opiniis digna, kiu do estas vi por ŝin malŝati? Estas certe, ke la Savinto ŝin tre bone konis kaj ke tial li ekamis ŝin pli ol nin. Prefere ni hontu! Ni vestu nin per la perfekta Homo kaj <ni plenumu> nian taskon, ni prediku la evangelion, neniom limigante nek leĝofarante, krom laŭ kion diris la Savinto.

Tiam Levi <...> kaj ili foriris por prediki la evangelion.

---



*Post tio ĉi mi refoje donis la eblon por serioza legado dum iom da tempo; poste ni interparolis pri la teksto. Pluraj ĉeestantinoj fakte rekonis iel la 'Vojaĝo-temon' en sia persona vivovojo. Spirita kreskado ja similas foje baraktadon por superi barojn. Kaj obstakloj por vera spirita kresko foje estas deziro je io / iu, se ĝi onin obsedas; foje estas nescio-kien-direktiĝi tia obstaklo; kolero foje povas esti instiga, stimula por ekhavi forton, mem elekti sian vojon, kiel pluraj spertis, sed kolero ankaŭ povas kvazaŭ lamigi ĉiun eblon je evoluo. La tago ne sufiĉis en nia grupo por plene trakti la tekston tutdetale. Post tio ni disiris hejmen.*

---